*Du Quoin, Illinois.*—Harley C. Croessman, kies adreso estas 423 Main street, publikigas longan kaj bonan artikolon pri Esperanto en loka ĵurnalo.

### PRI FORTIGO ĈE KOMERCISTOJ

Kelkaj komercistoj komencas uzi Esperanton. Ĉu ne estus eble profiti tion por propagandi? Ekzemple:

En *Le Journal* de la 29'an de Novembro, oni legas tri reklamojn: firmo de hejtiloj J. Borderel; plumingo Onoto; Franĉa fabrikisto de armiloj kaj cikloj el Saint-Etienne. Ni, Esperantistoj, scias, ke tiuj firmoj uzas Esperanton; sed ĉu ankaŭ la neesperantistoj?

Mi do opinias, ke kiam komercisto uzanta Esperanton presigas reklamon en neesperantista ĵurnalo, la grupo de lia urbo devus al li proponi, ke li aldonu post sia reklamo: "Ni (aŭ pli bone: oni) korespondas en Esperanto." Tiuj vortoj estas por ĉiuj facile kompreneblaj; ili ne bezonas specialajn preslitterojn, kaj ĉiu ajn ĵurnalo povus ilin presigi. Kompreneble, la grupo pagus la plilongigon de la anonco (unu linio!) kaj tio ne estus senhaviga elspezo. Sed,

kontraŭe, la rezultato estus granda. Ĉar, mi reprenas la jam diritan ekzemplon, se tio estus farita, la neesperantista publiko vidus, ke almenaŭ tri grandaj firmoj uzas Esperanton, kaj ke nia lingvo ne estas afero projekta, sed jam disvastigita kaj utila.

Eble la aliaj firmoj, vidante tiun bonan rimedon por havi klientojn, ĵaluzus la esperantistan magazinon, kaj baldaŭ ni vidus la naciajn ĵurnalojn diskovritajn per reklamoj redaktitaj en Esperanto.

Kiu aŭdas nur unu sonorilon, tiu aŭdas nur unu sonoron, diras proverbo. Vi povas proponi mian ideon al la Esperantistaro, kiu eble povos plibonigi ĝin—ĉar plibonigoj estas ĉiam bonaj aferoj, kiam ili ne celas subfosi, kaŝemalkaŝe, vole-nevole, nian bonegan Esperanton.—*Raoul Glayze*, en Lingvo Internacia.

# LITERATURO

## LA AMANTOJ DE GERTO.

*Laŭ William Norris tradukis E. J. Burnham*  
(Daŭrigo)



LAFO fortege penis ĵeti kvazaŭ en lo koro de Luknaro, pensi pri la soleco de la viro, kaj pri lia mirinda povo koncentrigi ĉiun penson, ĉiun fajreron de pasio en ia sola afero; li memoris kiel, dum pasintaj jaroj, Luknaro ekkaptis avide sciadon: kiel tiu sciado estis venkinta lin, devigis lin fariĝi pli kaj pli soleca; devigis lin malestimi aliajn, pro tio, ke ili ia ne sciis; li memoris, kun ia ekdoloro, kiel Luknaro, per unu fojo, eĉ lin malestimis; jes, li ĝuste tiam povis elporti ke li memoru ree la tutajn maldolĉajn memorojn de tiu tempo; kiel li vidis tion surrampanta sian amikon; kie li vidis ĝin kontraŭbatalita, ankoraŭ venkanta, gajnanta tiel nepre; li rememoris pri tiu tago, kiam Luknaro elparolis malkaŝe sian malestimon, dume maldolĉe malestimante lian propran fieron kaj lin mem; li memoris kiel Luknaro revenis al li, kiam la sciado mankis al li, kaj ankoraŭ kiel estas neniam tiel same, kiel estis inter ili; li memoris ankaŭ multe da bataloj, en kiuj ili kunrajdis flanko ĉe flanko, Luknaro tiel brava kiel li mem, tamen ĉiam kun la ŝargo de sinmalestimo sur si—tio, kio fariĝis lin malestimi eĉ sian propran bravecon; samtempe Olafo ĝojegis pro sia propra, kaj respektigis tion de aliaj; tiam li memoris kiel li fariĝis reĝo, kiel la amo por liaj samlandanoj de tiam fariĝis multe pli pasio, vera amo, ol ĝi estis; kaj tra ĉiuj tiuj ĉi aferoj li kvazaŭ penis esti Luknaro—ne tia malfacilaĵo por li; ĉar per lia malegoisteco, li gajnis tiun fortegan povon de simpatio por aliaj, kiun nenia plej furioza pasio povas tute flankenmeti, eĉ dum mallonga tempo. Tial

li ankaŭ havis siajn pensojn, ne facile legataj de aliaj, ne esprimataj de si mem.

Tiamaniere la nokto pasis, kaj ili iris por ripozi, aŭ kio tiel ŝajnis, ĝis ili estis vekataj, tre frue matene, de la sono de trumpeto sonanta tute ĉirkaŭ la arbara bordo de la rivero. La kavaliroj kaj Sigurdo leviĝis kaj eliris el la dometo, konante ke la trumpeto estas amika; kaj baldaŭ ilin renkontis bando de tute armitaj kavaliroj, kiui vidante ilin haltiĝis.

“Via Reĝa Moŝto, Olafo,” diris ilia ĉefo, maljuna, blankhara kavaliro, “dank’ al Dio! ke ni estas trovinta vin! Kiam ni atingis la palacon, lastan nokton, vin perdinte antaŭe, nin atendis ambasadoroj, alportantaj deklaraciojn de milito de la tri dukoj kaj lia reĝa moŝto Boraco; tial nun mi petegas vin, ke vi tuj reiru! Tute ĉirkaŭe por viroj mi estas sendinta, sed tempo urĝas, kaj estas kredinda raporto ke la reĝo Boraco jam komencis sian marŝon al la ebenaĵo; rilate al la tri dukoj (kiujn konsternigu la Sinjoro!), la armeo de Lia Grafa Moŝto, Hugo, respondos pri ili, almenaŭ por deteni ilin ĝis kiam ni estas batintaj la reĝon Boracon; sed pro li ni devas marŝi tuj, se lin ni intencas kapti. Nur venu, Reĝo Olafo, kaj ĉio estos bona.”

Tiam Sigurdo surgenuiĝis antaŭ la Reĝo, dum tiu staris kun ekbrilantaj okuloj kaj ekrugiĝantaj vangoj, pensante kiel la malamikoj de Dio estis rapidantaj al sia pereco; tamen, spite lia ĝojo, li sopiris vidi Gerton, eble por la lasta fojo; ĉar ŝi ne ĉeestas, nek eĉ je la voko de Sigurdo.

Tial la Reĝo ridetis malgaje, kiam Sigurdo senkulpigis ŝin, dirante ke ŝi timas tiel grandan viron kiel la Reĝo; li ne povas sin deteni de la deziro ke ŝi lin amu, eĉ kvankam, kiel li diris al si mem, li intencas ŝin fordoni; li tute ne povis

konfesi kian al si diferencon ŝia amo povus fari.

Tiam li volis doni al Sigurdo donacojn de mono kaj juveloj, sed Sigurdo ne volis preni ilin; nur, fine, estante devigita, li prenis la ponardon de la Reĝo kies tenilo estis kurioze ellaborita.

Tiam ili ĉiuj forrajdis kune, Barulfo, la maljuna viro, flanke al la Reĝo, kaj avida parolante kun li rilate al la venontaj militoj; sed Luknaro malantaŭeniĝis kaj diris al iu nenian vorton.

### *La Rajdo de Luknaro.*

Tiam, dum kelkaj tagoj, ĉiu viro laboris kiel eble plej bone por tio, ke li povu iri, kiel li devas, renkonte al la invadantoj; ankoraŭ dum la tuta laboro, Luknaro ŝajnis tre maltrankvila; sed la Reĝo estis ekstere trankvila kaj gaja, malgraŭ kia ajn pasio penegus lin feribgi.

Sed unu tagon, dum li ripozis, klinante el fenestro de la palaco, kiu estis preskaŭ kaŝata per la amasigita jasmeno kaj klemato, ĉevalhufojn li aŭdis, kaj tuj vidis Luknaron, lia flaypalaŭ vizaĝo entirata en malrideto de avideco, sur bona ĉevalo, malpeze armata, ĵus forrajdonta. Olafo bone scias kien.

La koron de Olafo trapikis akra ekdoloro; li sin sentis kapturna kaj konfuza; tra la klemataj trunketoj kaj torditaj kreskteniloj, tra la leviĝanta de sia koro nebuleto, li neklare vidis Luknaron, dum tiu suprentiras sin, levas sian bridmanon, kaj kliniĝas antaŭen, dum sia ĉevalo galopante eksaltadas; li sin sentis malsana, liaj fortaj manoj tremis, kaj tra la turniĝado de lia cerbo kaj la zumado en liaj oreloj li aŭdis sin mem ekkrii, "Bonan prosperon, Siro Luknaro, por via amindumado!" Tio estis sufiĉa; lia koro malleviĝis, kaj lia pasio dum momento malvarmiĝis, kiam li vidis kiel terure la vizaĝo de Luknaro ŝanĝiĝas ĉe la bone komprenataj vortoj; tiel maltrankvila kiel ĝi estis, kia ĝi estas nun, kiam subite la tuta konscienco de la homo aperas sur tiu malgranda tabulo el argilo — lia vizaĝo?

Tiu turniĝis sian ĉevalon kaj rapide rajdis retuinen. Olafo lin atendis tie, apenaŭ sciante tion, kion li faras, en la

komenco; tamen, en mallonga tempo, io, pri venonta morto pensoj eble, firmigas sian cerbon kaj retenas sian pasion; li aŭdis baldaŭ la rapidajn piedsonojn de iu paŝeganta, kaj trankvile paŝis al la pordo, kie li renkontis Luknaron, kun liaj dentoj fiksitaj, liaj lipoj iomete malfermitaj, por tio, ke lia malfacile tirata spirado lin ne sufoku, liaj nigraj okuloj fiksitaj antaŭen kaj brilantaj malride de sub liaj pezaj brovoj, similaj al veterŝirmilaj tegmentoj.

Olafo lin prenis ĉe la brako, kaj lin forte manpremiĝis; sed tiu ĝin perforte fortiris, kaj sin ĵetis malsupren antaŭ la piedoj de Olafo.

"Reĝo Olafo," li pasie diris, "mi ne iros, mi do restos tie ĉi, se vi min tiamaniere rigardas—per via larĝa, blanka frunto kaj oraj hartufoj—vi! Mi mortos tie ĉi, mi ne povos vivi ĝis kiam mi la malamikon renkontos!"

Olafo kliniĝis por lin levi, sed tiu sin tiris pli malantaŭe de li, tiam, ankoraŭ genufleksante, diris:

"Nenia vorto—ankoraŭ, Reĝo, el vi. Ĉu ne estis sufiĉe, Olafo, ke vi zorgis por mi kaj min amis dum la tagoj antaŭ vi fariĝis Reĝo—min, kiu estis soleca, nekontenta viro, nigra loketo sur klara blankeco de la plej amanta popolo en la mondo? Ĉu ne estis sufiĉe ke, en la tago kiam la tuta popolo kriegis por Olafo, lin nomante la plej saĝa kaj plej bona, vi, kun la krono ankoraŭ sur via kapo, la sankta oleo ne seka tie, min prenis je la mano kaj diris al ĉiuj el la kavaliroj kaj la tuta popolo, kiujn vi tiel multe amis, kiujn mi (min helpu Dio!) ne amas: 'Jen Luknaro, mia amiko, kiu donis al mi la tutan saĝon kiun mi iam havis?' Ho, Reĝo! se vi min estus rigardinta en tiu momento, kaj estus vidinta, eĉ tiam, miajn rondtordantajn lipojn dirantajn al mia perfida koro, 'Mi estas tiom pli saĝa ol tiuj ĉi nesauĝuloj!' Sed viaj klaraj okuloj nur vidis rekte antaŭen, ekrigardante super la kapoj de la popolo kiu estis kara al vi, malestimata de mi. Ĉu ne estis sufiĉe, Reĝo Olafo, ke vi, dum la tagoj pasis, ankoraŭ min tenante la plej proksima al vi, ankoraŭ min demandante pri ĉio, komencus degeligi mian malmolan koron, skui mian kredon en la sen-

fideleco de la filoj de Adamo? Ĉu ne estis tiuj ĉi aferoj sufiĉaj, ke vi ankaŭ, antaŭ ĉio trovante pretekstojn, eĉ al via propra koro, por malbonigi la noblecon de via ofero, fordonus al mi vian amon, tute ne kiel mi nun faras al vi, bruege, sed trankvile, vorton ne parolante; tiam, poste, kiam vi vidis kun kia malnobla avideco mi penis kapti la forlasitan de vi amon, timante terurajn aferojn por mia mizerega animo, se tiu ĉi daŭrigas, min haltigus, simile al mia protektanta anĝelo, ĵus kiam mi estis forrampanta simile al ŝtelisto en la nokto, kaj eble nun —min helpu Dio!—min helpu Dio!—eble eĉ min devigus fari unu aferon, dum la tuta daŭrado de mia vivo, kiu estas bona en Liaj okuloj nor esti farinta.”

Tiam, dum li tie surĝenuiĝis, simile al homo antaŭ Dio, la Reĝo malrapide parolis, kun humila vizaĝo vere, kaj larmeme, sed preskaŭ ridetante, ĉar ĉiuj aferoj ŝajnis tiel klaraj en la momento de profeta vidaĵo.

“Kara kavaliro, viaj vortoj al mi ŝajnas kiel maldolĉa satiro; ĉar mi vin ĵus ne reenokis por via saviĝo, sed pro tio, ke mia egoista pasio (pensu pri egoista reĝo, Luknaro, kia mizero!) mia pasio min forportis. Ho, pardonu min! Ĉar vere mi deziras ke vi havu ŝin; pensu do kiel multe da zorgoj, kaj ĝojoj ankaŭ, estas prizorgante tiun ĉi popolon, kiun al mi donis Dio; mi estas certa ke mi ne estos longatempе tute malfeliĉa, kio ajn okazos. Iafoje, eble, kiam mi estas laca, jen en la silenta nokto, jen en la mortanta aŭtuno, mi havos pensojn pri ŝi; sed ili neniam estos netolereblaj, ĉar nenia potenco, tere aŭ ĉiele, povas malhelpi ke mi amu ŝin. Estos ja nenia honto por vi, Luknaro; ĉu vi ne memoras kiel, en la pasintaj tagoj, tiam, kiam pri tiu ĉi afero ni paroladis, vi ofte diris (en kio eĉ tiam mi kun vi aŭnaŭ konsentis) ke la amo de viro al virino devas antaŭiri ĉion, antaŭ tuta amikeco, tuta devo, tuta honoro? Tiel vi pensis tiam; ĉu vi povas dubi nun?” Li ĉesis, kaj ne diris plu dum iom da tempo, tiam parolis ŝanceliĝe:

“Kaj tamen, kaj tamen—ĉu ni ne faras simile al la homoj, kiuj, kiel oni diras, kalkulas sen ilia mastro? Kion diros

Gerto? Ĉu ni ne devas scii pri tio, antaŭ ol tiu ĉi granda batalo estos batalita, el kiu, eble, nek unu nek alia de ni revenos viva? Kaj morgaŭ ni marŝos, kaj mi ne devas forlasi la konsilantaron aŭ mian laboron tie ĉi; tial, kara Luknaro, mi vin petegas, je via lojaleco, ke vi ree sursaltu kaj tuj forrajdu al la dometo, kaj petu ŝin ĉu ŝi—vin amas—kaj ĉu—ĉu—Luknaro, ni eble estas proksime al la morto, kio ajn okazos, ni devas esti fratoj—tial, Dio favoru vin, en via amindumado.”

Luknaro estis leviĝinta dum la Reĝo parolis, kaj staris antaŭ li, kun kapo mallevita supren sur lia brusto, ĝis tiu ĉesis, tiam levis sian radilumatan nun de speco de ĝojo vizaĝon al la vizaĝo de Olofo; neniam vorton li parolis, kvazaŭ tiu ĝojo, aŭ io alia, konfuza kaj rapidanta, kio apartenis al ĝi, estis tro granda por li, sed, fleksante, kisis la manon de la Reĝo, kaj foriris.

Tiam Olofo ree kliniĝis el la fenestro kaj lin denove rigardadis preteriri rapide, ĝis la sono de ĉevalhufoj formortis; tiam li sin direktis al la konsilanejo, pensante:

“Lia vizaĝo ne estas simila al la vizaĝo de viro, kiu iras por fari tion, kion li opinias malbona; mi timas ke li ne iros kiel mia ambasadoro—ne, ĉu mi ja timas? Tamen, certe, tio estus la plej bona maniero prosperigi sian propran amindumadon. Ho, Gerto! Gerto! eble la glavo tranĉos tiun ĉi ligotuberon, nun tiel firme volvitan; ankoraŭ mi ne preĝos por tio, nur ke Luknaro vivu.”

Tiam tuj li estis en la mezo de la grandsinjoroj. Ho, por Luknaro kia laca rajdo tiu estis! Estis frue matene kiam li ekiris, tute tagmeze kiam li ekiris kondukilojn ĉe la pordo de la dometo; kaj dum la suno leviĝis pli alte, tiu ĝojo, kiun en la komenco li havis ĉe lia nobla ago, de lia vizaĝo malaperis, eĉ kiel la roso de la vizaĝo de la herbejo, kaj kiam li desaltis ĉe tiu domo de Sigurdo, jen lia vizaĝo estis malĝojega kaj kadavra.

(Daŭrigota)



## ĈIO PRO LA LIBROJ.

El Angla lingvo tradukis. *B. F. Schubert,*  
Washington.

**A**NTAŭ jam longe vivadis sanktulo kaj lia disciplo proksime de vilaĝo apud la montaro himalaja. Li posedis aregon da libroj kiuj entenis multe da perloj grandvaloraj je vereco kaj saĝeco. Kiam ajn la krepusko alproksimiĝis vesperon post vespero, la vilaĝanoj laŭkutime kunvenis je la kverko multnombra apud la kabano del sanktulo por aŭskulti la vortojn sanktajn, por riĉigi sian animon kaj pasigi sian vivon paceme kaj ĝojege. Unu tagon li kunvokis la vilaĝanojn kaj preparolis sian intencon ekfari longedaŭran pilgrimadon por viziti ĉiujn lokojn sanktajn en la lando. Li petegis ilin ĉiam esti afablaj al sia juna disciplo kiun li lasos kiel provizora anstataŭulo, kaj petis ilin kunveni, laŭkutime, ĉiuvespere, por aŭdi liajn klarigojn de la Sankta Skribo. Plena je amo kaj malĝojo ĉiuj el ili promesis plenumi la petojn. Dorninte la benon al li kaj lin peteginte protekti la librojn sanktajn kaj rarajn kontraŭ la atakoj de la musoj, li adiaŭdiras la disciplon kaj foriras.

Estante sindona kaj obeema, la disciplo pasigis sendorme la noktojn kaj ekbatis de tempo al tempo inter la libroj por fortimigi la musojn kiuj ĉiutempe kaŭzis multe la difektaĵoj en ili. Multofte li sentis sin tiel laca kaj dormema en la sekvinta tago ke li ne povis sin dediĉi al preĝo kaj studado. Por malpezigi liajn devojn, la vilaĝanoj alportis katon kiu liberigus la lokon de la musoj, por ke li havu la pacon del animo. Ne longe post la alveno de la kato la disciplo ree ekĉagreniĝis pro manko de lakto por nutri la katon. Ekvidinte kaj pripensinte la ŝajne seneliran situacion, la vilaĝanoj decidis venigi bovinon por provizi la lakton por la kato kiu protektis la librojn valorajn de la sanktulo.

La juna disciplo diligente prizorgis la bovinon. Tio ĉi okupis multe da tempo kaj pro tio li tre ofte ne povis sin pretigi klarigi kaj legi al la vilaĝanoj kiuj kun-

venis por aŭdi la sanktajn vortojn. Estas ja fakto, la vilaĝanoj decidis ĉe si mem, ke la disciplo estas trookupata prizorgi la bovinon. Ni sendu al li la Brahman virgulinon por ke ŝi malpezigu liajn devojn kaj ebligu lin plimulte sin dediĉi legi el la Sankta Skribo. Je la alveno de la Brahma virgulino la devoj de la disciplo estis multe malpliigitaj, sed samtempe ĝistiam tute nekonata emocio ekmovis tutan lian estaĵon. Iom post iom la eksento de l'amo lumigis la korojn de la du, kaj pli kaj pli ili interaltiriĝis. La vilaĝanoj ne povis ne ekvidi la grandan aliformiĝon en la tuta vivo kaj sintenado de la juna disciplo. Pripensinte la tutan aferon, ili decidis, post interkonsiliĝo, ke estas plej bonmaniere edzece kunigi la virgulinon kaj la disciplon. Je la ĉeesto de la tuta vilaĝanaro ili estis edzigitaj por la ĝojege de ĉiuj.

Du jarojn poste la sanktulo ree alvenis hejmen. Li multe miregis ekvidi belegan domon en la loko de la eta kabano, kaj la enloĝanton portanta etan infanon sur siaj brakoj. Kiam li ekvidis la sanktulon, tutaj liaj timoj je la rompiĝo de la sanktaj promesoj ekstaris antaŭ la konscienco de la disciplo kaj, sin ĵetante je la piedoj de la majstro, li diris: "Ĉio nur okazis por protekti la sanktajn librojn, majstro mia!" Ekkompreneante la tutan situacion, anstataŭ riproĉi la disciplon, li benadis la geedzojn feliĉajn, kaj solene admonis ilin pasigadi kunvivadon idealan.

## PRI KIUJ ONI RIDIS.

**L**A pasinto jaro estis plena je satiro, sarkasmo kaj ŝercoj — komikaj okazoj en la tuta mondo — Ameriko prenis la premion pro ridanaj okazoj.

Ja, en la jaro 1909 okazis multe da aferoj, pri kiuj oni havis ion por ridi.

Kaj tie ĉi mi ne devas rakonti al la legantoj pri tia ŝerco: ekzemple, kiel Sinjoro Kuk ekludis al la mondo; tion ja ĉiu scias.

Por tiuj, kiuj interesiĝas plej multe pri la ŝercaj kaj humoraj flankoj de la vivo, la jaro 1909 estis unu longa ŝerca ĉapitro.

La ridaĵoj komenciĝis en Januaro. En la nomata monato en la ŝtato Nov-Jersio (New Jersey) ekdisvastiĝis rakontoj pri

“diablo,” kiu sin ĉirkaŭportis ĉirkaŭ diversaj lokoj de la ŝtato. Negroj ĵuris, ke ili vidis lin per “siaj propraj okuloj.” Servistinoj priskribis al siaj mastrinoj kiel “li” ŝajnas. Ĉiuj maljunulinoj unu al la alia rakontis timigajn historiojn pri “li”

Kelkaj deklaris, ke ili “vidis lin tre bone”; kaj ke “li” havas du grandajn nigrajnflugilojn.

Aliaj ekrimarkis sur “li” paron da kornoj tiel altaj, kiel telegrafaj stangoj.

Fine oni trovis “la diablon” malviva en arbaro. Tio estis unika simia speco, kiu estas maloftaĵo en tiuj lokoj; kaj kiu forkuris el ia bestejo.

Gin la bona Nov Jersiaj ŝtatanoj kredis esti “la malbonulo, la diablo.”

\* \* \*

Je Februaro oni sciigis en Parizo pri romano, kiu donis al cinikuloj kaj sarkasmluloj sufiĉe da materialo por ŝercoj kaj spritaĵoj.

Kvardek jarojn antaŭe juna rekruto devis foriri al la milito. Sekrete li amis unu knabinon. Antaŭ ol sia forveturo li deziris sciigi ĉu la knabino ankaŭ amas lin. tial li alsendis al ŝi bukedon da floroj; kaj en la florojn li enmetis bileton kun la jena surskribo: “Se vi amas min, kiel signo de tio portu hodiaŭ vespere tiun ĉi bukedon.”

La knabino, ricevinte la bukedon, ne rimarkis la enfermitan bileton, kaj tial ŝi formetis la bukedon ien. Poste kiam la floroj velkiĝis, ŝi enmetis la bukedon inter la paĝojn de granda libro.

La jaroj flugadis. Unu tagon je la komenco de Februaro, ĉe amuzejo en Parizo renkontiĝis grizhara generalo kaj maljuna sinjorino, kiuj estis konataj unu al la alia de siaj junaj jaroj. Li rakontis al ŝi pri la diversaj gravaj okazintaĵoj, kiuj okazis kun li de la tempo de kiam li forveturis al la milito antaŭ kvardek jaroj.

“Kaj kia estas la kaŭzo, ke vi neniam edziĝis?” “Vi, sinjorino, estas la kaŭzo de tio. Se vi donus al mi la signon, pri kiu mi skribis sur la bileton en mia bukedo . . .”

La sinjorino iris hejmen. Ŝi malfermis la libron; kaj elfalis la kadukaj folietoj de la bukedo. Ankaŭ elfalis la flaviĝinta peceto da papero. Tion, kio estis skribita tie, estis facile tralegi.

Ree kunrenkontis la generalo kun lia malnova amatino. Kaj ĉar ŝi estis vidvino, ili decidis, ke ankaŭ nun ne estas tro malfrue; kaj ili fariĝis geedzoj.

\* \* \*

Dum la sama monato eminenta londona gazeto sciigis, ke oni eltrovis aŭ malkovris en Londono maljunan juĝiston, kiu neniam en sia vivo uzis telefonon; kaj kiu deklaris, ke li neniel povas kompreni la utilecon de ĝi. Ĝis dek jaroj antaŭ, li tute ne kredis, ke ekzistas tia objekto kiel telefono en la mondo. Sed kiel en lasta tempo sin trovas tia instrumento ĉe la kortumejo mem, kaj kiel li mem vidis, ke la kortumeja helpanto parolis multe da fojoj per ĝi, li nun kredas, ke ĝi ja ekzistas; sed al kio ĝi taŭgas, li ne klare envidas. Pitsburga paroĥestro povus ja doni al li respondon pri ĝi. Tiu ĉi ekleziulo havis inter siaj parohanoj multajn mutulojn kaj duonmutulojn; kaj ĉar ili ne povis aŭskulti liajn predikojn, sidante en la preĝejo, ili dormetadis. Nu! al la pastro alvenis bona ideo: Li alfiksigus telefonojn al la seĝoj en la preĝejo, por ke la mutuloj povu aŭskulti, kion li parolis.

\* \* \*

En Filidelfio edzo procesigis sian edzinon al eksedzigo, kulpiginte ŝin, ke ŝi havas spiriton kiel “amanton,” kun kiu ŝi ofte havas rendevuojn. Tiu ĉi spirito, la kulpiganto plendis, tute detruis lian feliĉan familivivon. Lia edzino estas tute sindonanta al la spirito; kaj pri li, la leĝa edzo, ŝi entute ne zorgas. Plie, ŝi eĉ ne hontas rakonti al siaj najbaroj pri la amindumaj aferoj, kiujn ŝi havas kun sia plej bona, plej ĉarma, plej saĝa anĝelo, la spirito.

Iu artisto ankaŭ plendis, ke certa malviva lia amatino, ne lasos lin trankvila. Kaj ĵaluza ŝi estas—Dio kompatu! Ĉiun fojon, kiam li pentras pentraĵojn de alia virino, ŝi, la malvivulino, atakadas lin

pro ĵaluzo, kaj disŝiras la pentraĵon! Precipe ŝi koleriĝas, kiam la bildo reprezentas knabinon, kiu estas juna kaj bela.

En Kalamazuo homo freniziĝis pro veto. Li vetis, ke certa ĉevalo, kiu estis fama pri sia grandeco, pezos ne pli multe ol dekunu centoj da funtoj. Kaj la vetpuno konsistis je tio: Se la ĉevalo pesos unu funton pli multe ol mil kaj cent funtoj, li devas pagi unu fabon kiel vetpuno; du funtojn pli peze—kvar fabojn, kvar funtojn pli peze—dekses fabojn, kaj tiel plu. Ĝi estas la malnova friponaĵo, per kiu oni jam friponis niajn pravaĵojn. Sed la "saĝulo" de Kalamazuo lasis sin delogi en la reton.

Oni pezis la ĉevalon, kaj eltroviĝis, ke ĝi, la ĉevalo, estas kun kelkcentoj da funtoj pli peza ol mil kaj unu cent.

\* \* \*

Iu "elpensisto" petis en Vaŝingtono patenton por elpenaĵo, pri kiu, kiel li certigis, li povos detiri la radiojn de la suno, kaj lumigos ilin je nokto. Kaj li certigis, ke ĝi kostos pli malkare ol gaso kaj eĉ ol kandeloj.

Dua "elpensisto" elpensis tian lampon, en kiu elektraĵoj servus kiel brulmaterialo, kiun oni neniam devus renovigi. Kaj el Aŭstrio iu homo alportis maŝineton, kiu, kiel li klarigis, "moviĝos eterne."

\* \* \*

La gazetoj de Ĉikago sciigis, ke la ŝtelistoj tie organizigis sin je trusto; kaj disdividis la urbon je distriktoj, tiel ke unu ŝtelisto ne konkuros kun alia, sed ĉiu havos sian kvartalon, kien li povos iri ŝteli. Kaj estos malpermesite iri en aliajn kvartalojn, kiuj apartenas al aliaj ŝtelistoj.

\* \* \*

En suda Bruklino oni eltrovis maljunulon, kiu neniam en la daŭro de sia vivo, transveturis al Nov-Jorka, kvankam li konfesis, ke li scias, ke tia urbo ekzistas, kaj ĝi ŝajnas esti ne malproksima de Bruklino.

\* \* \*

En Nebrasko, la leĝfarantoj faris leĝon, ke la litdrapoj ĉe la loĝejoj kaj

hoteloj devas havi ne malpli ol naŭ futoj da longeco.

\* \* \*

En Pensilvanio, oni ĉe la leĝdonejo proponis per bilo, ke estu permesite doni al redaktoro survangon, se li kalumnias iun en sia gazeto.

\* \* \*

En Jerzvilto, ŝtato Ilinojso, oni eltrovis viron, kiu estis tute freŝa kaj sana, sed kiu kuŝadis, je la daŭro de la lastaj dek jaroj, en la lito. Kaj, kiam oni demandis de li klarigon, li respondis: Kio estus la profito de la ekleviĝo? Oni ja devas iele rekuŝiĝi!

\* \* \*

En Nov-Jorko oni eltrovis virinon, kiu edziniĝis je la jaro mil okcent naŭa, kiam ŝi estis nur naŭjara; kaj kiu, en la daŭro de sia longa vivo enterigis ok edzojn. Mallonge, estis sufiĉe por ridi en la pasinta jaro.

—El la ĵurnalo *Vorwaerts* tradukis *Mozeso Levin*.

## LA BARBIRO DE BAGDADO

**E**N LA daŭro de la regado de la Granda Kalifo, loĝis en la urbo Bagdado fama barbiro je la nomo Alio. Li estis multe laŭdata pro sia firma mano, kaj li povis razi kapon, aŭ tondi barbon aŭ vangharojn kun siaj okuloj blindigitaj. Ne estis elegantulo en Bagdado kiu ne dungis lin, kaj li havis tiom da laborafero ke fine li tre fieriĝis kaj samtempe treege malĝentiliĝis.

La fajroligno ĉiam estis nesufiĉa ĉe Bagdado, kaj unu tagon okazis ke malriĉa arbohakisto nesciante la karakteron de Alio, haltis ĉe lia barbirejo por vendi al li ŝarĝon da ligno kiun li ĵus estis alportinta de distanco sur sia azeno. Alio tuj oferis al li difinitan monsumon "por ĉiom de la ligno kiu estas sur la azeno." La arbohakisto akceptis la proponon, senŝarĝis sian beston, kaj postulis la monon.

"Ankoraŭ vi ne donis al mi ĉiom de la ligno," diris la barbiro; "mi devas havi ankaŭ vian lignan ŝarĝelon: tia estis nia kontrakto."

“Kiel!” ekkriis la alia kun grandega miro; “kiu ajn aŭdis pri tia kontrakto! Estas tute neeble.”

Sed la tirana barbiro insistis, kaj post multaj vortoj li ekkaptis la ŝarĝselon kune kun la tuta ŝarĝo, kaj forsendis la kompatindan kamparon en stato de la plej granda maltrankvileco. La arbohakisto tuj alkuris al la Kado kaj al li rakontis sian plendindaĵon, sed la Kado estis unu el la klientoj de la barbiro, kaj rifuzis aŭskulti al la plendo. Tiam la malfeliĉulo iris al pli alta juĝisto kiu ankaŭ favoris Alion, kaj kiu primokis pri la rakonto. Tute malĝojigite la kamparano ne perdis la kuraĝon, sed tuj dungis skribiston por ke li skribigu pet-skrifton al la Kalifo mem. La tujeco de la Kalifo, rilate al la legado de petskriboj, estas ĉiesciata, kaj ne estis longtempe antaŭ ol la arbohakisto estis ordonata ĉeesti ĉe la trono de la Kalifo.

Kiam la petanto alproksimiĝis al la Kalifo li surgenuiĝis kaj kisis la teron; tiam faldante la brakojn antaŭ si, la manojn kovritajn per la manikoj de lia mantelo, kaj siajn piedojn proksimajn unu de alia, li atendis la decidon pri sia proceso.

“Amiko,” diris la Kalifo, “la barbiro havas vortojn siaflanke; vi havas la justecon viaflanke. La leĝo devas esti difinata per vortoj, kaj kontraktoj devas esti farataj per vortoj. La leĝo devas havi sian rajton aŭ ĝi estas nenio; kaj do kontraktoj devas esti plenumataj aŭ ne estus ia bona fido inter homo kaj homo. Tial la barbiro devas teni ĉiom de sia fajroligno, sed—”

Tiam alvokante la arbohakiston apude la Kalifo paroletis en lian orelon, kaj forsendis lin tute kontentigitan. La arbohakisto farinte salutegon prenis sian azenon per la kolbrido kaj reiris hejme.

Post kelkaj tagoj li aliris al la barbiro kvazaŭ nenio inter ili antaŭe okazis, petante ke li mem kaj lia kunulo de la kamparo povu ĝui la manlertecon de tia fama razisto. Ili rapide interkompreniĝis pri la prezo de la du razadoj, kaj la barbiro komencis sian taskon je la kam-

parano. Kiam la barbo de tiu estis razita taŭge Alio demandis kie estas lia kunulo.

“Li staras ĵus ekstere,” respondis la arbohakisto; “li envenos tuj.” Samtempe li iris eksteren, kaj enkondukis sian azenon per la kolbrido. “Jen mia kunulo! Razu lin.”

“Lin razi!” akrekriis la barbiro; “ĉu ne estas sufiĉe ke mi malnobligu min tuŝante vin mem, sed plie vi insultas min petante ke mi razu vian azenon! For de tie ĉi!”

La arbohakisto tuj alkuris al la Kalifo kaj rakontis la ĉirkonstancon.

“Alkonduku Alion kaj liajn razilojn al mi tuj,” ekkriis la Kalifo al unu el siaj oficiroj, kaj en la daŭro de dek minutoj la barbiro staris apud la juĝisto.

“Kial vi rifuzas razi la kunulon de tiu ĉi viro,” demandis la Kalifo al la barbiro; “ĉu ne estis tio via interkompreniĝo?”

Alio kisante la teron respondis, “Estas vere, ho Kalifo, ke tio estis nia interkompreniĝo, sed kiu ajn antaŭe faris kunulon je azeno?”

“Sufiĉe vere,” diris la Kalifo, “sed ankaŭ kiu ajn antaŭe pensis postuli ke la ŝarĝelo estu enkalkulata en ŝarĝo da fajroligno? Ne, ne, plenumu vian kontrakton.”


Tiel la barbiro devis prepari grandan kvanton da saĝo, sapumi la azenon de la kapo al la piedoj, kaj razi lin en la ĉeestado de la Kalifo kaj de la tuta korteganaro, dum la apudstarantoj mokis kaj humiligis la malfeliĉan raziston.

La malriĉa arbohakisto tiam estis forsendata portante mondonacon, kaj la tuta Bagdado ehis la historion, kaj laŭdis la justecon de la Kalifo.

—*Sybil E. Bailey.*

#### CAN YOU SOLVE THIS?

**W**E HAVE received from the *Librairie de l'Esperanto* the following letter pertaining to the rebus. Every Esperantist should write to the publishers of *Pages Folles* at the address given, asking for further information.



**Amerika Esperantisto:**

Ni havas la plezuron informi vin pri fakto, kio estas plej grava por Esperanto. Franca humora gazeto, "Pages Folles," eldonata en Paris kaj tre konata en Franclando ĵus komencis la publikigon de rebusoj en Esperanto.

Ni sendas al vi, kun tiu letero, ekzemplerojn de la numero kiu enhavas la unuan rebuson. Bonvolu rimarki kaj sciigi al viaj legantoj, ke la gazeto "Pages Folles" daŭrigos publikigi ĉiuspecajn konkursojn en Esperanto, kun multvaloraj premioj, nur se ĝi ricevos por tiu unua provo sufiĉan nombron da respondoj.

Ni do esperas, ke la Esperantistoj de la tuta mondo nin subtenos kaj ni energie petas ilin partopreni tiun unuan konkurson internacian.

Ni donas al vi ĉi-sube la tradukon de la avizo presita de la Redakcio kun la unua rebuso kaj petas vin ankaŭ komuniki ĝin al viaj legantoj:

Cu ni baldaŭ vidos realiĝi la grandan kaj belan revon pri lingvo internacia? La demando havas gravecon ĉefan kaj tujan. Ĉefan, ĉar lingvo internacia forigos multajn malkomprenigojn inter la diversaj civilizitaj nacioj de l'mondo. Tujan, ĉar la junaj generacioj povos eviti, de nun, se la afero sukcesos, la lernadon de multaj lingvoj. Ilia havo de scioj, pli malpeza en tiu rilato, pliriĝigos en alia.

Sed ĉu la paciencaj penoj de la protagonistoj de lingvo internacia vere estas baldaŭ sukcesontaj? Cu la movado restas reale tiel granda kiel oni pretendas? Ni volis fari eksperimenton.

Por tio, ni elektis Esperanton, ĉar ĝi estas, el ĉiuj projektoj prezentitaj dum la lastaj jaroj, tiu kiu kunigis plej multe da adeptoj. Ŝajnis al ni utila doni al la esperantistoj okazon kalkuli kiom ili estas.

La provo ne povis estis farata de specialistoj, ĉar ĝi estus konservinta karakteron de laboreja eksperimento. Ni deziras publikan eksperimenton, kaj donis al ĝi formon de rebuso. Por kuraĝigi la serĉantojn, bela serio de premioj estas difinita por la gajnontoj. La serio daŭros dum ses semajnoj (ses numeroj de "Pages Folles").

Oni nur bezonas deĉifri la rebuson ĉi-sube donitan kaj tiuj kiuj aperos en la kvin venontaj numeroj. Tiuj rebusoj formas sentencajn frazojn. Iom da studo kaj meza kono de Esperanto sufiĉos por ilin diveni. Ni konstato senpartie kiom da esperantistoj estos partoprenintaj la konkurson. Ni do forte konsilas al la anoj de lingvo internacia, ke ili partoprenu, eĉ se ili povas solvi nur unu el la donitaj problemoj.

Estas samtempe amuzaĵo kaj publika manifestacio, kiun ni organizas por ili, kaj ni aldonos, por fini, ke la rebusoj estas verkitaj de unu el la plej eminentaj esperantistoj.

Ni tre petas la konkurantojn, ke ili sendu siajn solvojn nur post la apero de la sesa kaj lasta rebuso. Ni donos, je tiu momento, informojn pri la templimo kaj sendmaniero de la solvoj."

# LA SANKTA AFERO

ARTHUR BAKER

**I**NTERPAROLIS pri la propagandado de Esperanto viroj—predikisto, kuracisto, redaktisto, komercisto. “Jes,” diris la komercisto, “mi konfesos, ke la propagandado de internacia lingvo estas tio, kion vi nomas ideala. Sed ĉar ni vivas en preskaŭ pure komerca epoko, ĉio devas havi komercan bazon.”

“Sed,” protestas la predikisto, “vi tro insistas je via propra vidpunkto. Vi vivas en komerca mondo, la redaktisto vivas en pensada kaj filozofia mondo, kuracisto vivas en mondo de naskado kaj mortado, de malsaniĝo kaj resaniĝo, dum mi vivas en mondo la plej grava, la mondo de spirita aferoj; sed ĉiu el ni vidas laŭ sia propra vidpunkto.”

“Tute prave!” enmetis la kuracisto. “Por mi mem, mi tute ne povas toleri la ideon de komercismo rilate al Esperanto. Ni profitus se ni povus elpeli el niaj rangoj ĉiujn kiuj volas el nia pure ideala afero tiri al si monon. Kion pri tio volas diri nia redaktista amiko?”

“Simple ke vi ĉiuj rezonas tro laŭ individua vidpunkto. Vi, Sro. Predikisto, ne volas konfesi ke via spirita afero estas ankaŭ korpa kaj komerca; vi, Sro. Kuracisto, ne volas konfesi, ke via kuracado de homaj korpoj rilatas ankaŭ spiritaĵojn; kaj Sro. Komercisto povas vidi ke ĉio havas komercan bazon, sed ne povas vidi en sia propra okupo ankaŭ la spiritan kaj idealan.”

*Predikisto:* Do vi konsentas kun Sro. Komercisto, ke la komerca koto malpurigas nin ĉiujn.

*Komercisto:* Sed vi ne donas taŭgan respekton al komercismo. Vi priparolas ĝin kvazaŭ ĝi estus peko, kvankam ĝi nur estas okupo.

*Redaktisto:* Pli akurate, ĝi estas metodo. Dum praaj tagoj la rego estis al la forta brako kaj lerta mano. Nun ĝi estas al la posedanto de fervojo kaj fabrikejo.

*Kuracisto:* Sed ni ne kritikis fervojon kaj fabrikejon. Ni kritikis la memprofiton, la memamon, kiu estas la ĉefa trajto de la komercismo.

*Redaktisto:* Sed ĉu memprofito estas efektive pli forta trajto ĉe komercistoj, ol ĉe aliaj?

*Predik:* Ĉu iu ĝin dubas?

*Komerc:* Jes, min ĝin dubas, kaj mi opinias, ke ĝi estas persona trajto, kaj ne okupa trajto. Ekzemple, mi ricevas, el mia komercejo, profiton da tri mil dolaroj ĉiujare, dum vi, el via pastraĵo, ricevas—?

*Predik:* Du mil.

*Komerc:* Bone, sed se oni petus vin veni al alia loko kaj ricevi kvin mil, kion vi farus?

*Predik:* Kompreneble mi akceptus, ĉar estus devo al mia familio.

*Komerc:* Precize; pro la bono de via familio vi serĉas monon, kaj tio estas spirita afero, plej laŭdebla; pro la bono de mia familio mi serĉas monon, kaj tio estas komercaĵa afero, plej mallaŭdinda!

*Redakt:* Sed vi, Doktoro, viaj manoj estas puraj. Vi tute ne malpurigas ilin per komercismo?

*Kurac:* Kompreneble mi ne povas kuraci senpage. Mi havas familion, kaj krom tio mi devas aĉeti novajn librojn, partopreni multekostajn kursojn de studado, por ke mi pli bone kuracu. Kaj, kompreneble, la kuracatoj devas pagi. Sed mi tute neas, ke tio estas komercismo. Mi ne metas antaŭ mia oficejo grandan elektran reklamilon. Mi ne publikigas grandegajn anoncojn en la ĵurnaloj.

*Redakt:* Kaj se vi farus tion, vi perdus viajn plej bonajn klientojn, ĉu ne?

*Kurac:* Kompreneble.

*Redakt:* Do estas granda merito en tio, ke vi ne faras tion, kio perdigus al vi grandan monsumon. Vi estas tre lerta, fari virton el tio. Sed vi kaj via edzino apartenas al multaj kluboj, kaj al du eklezioj. Vi kaŝas viajn politikajn opiniojn ĉar ili povus malhelpi vin. Via aŭtomobilo, viaj vestoj, la vestoj, manieroj kaj ĉarmoj de via edzino—ĉio, kion vi

posedas aŭ faras, aŭ ne posedas aŭ ne faras, estas por vi reklamilo, sed, kompreneble, vi ne reklamas!

*Komerc:* Kaj ĉu iu pretendas, ke Esperanto estas pli sankta afero ol la konservo de bonaj moroj per pastra helpo, aŭ la konservo de sanaj korpoj per kuracado? Ĉu Esperanto, aparten de religio, politiko, kuracado, edukado, savado de ŝipanoj el maro, povas sin tiri kaj diri sanktaĉe: "Mi apartenas al pli alta rango. Mi volas ricevi multe da mono, sed nenion doni. Se verkisto verkas, li verku senpage; se presisto presas, li presu senpage; se leterportisto portas esperantan poŝtkarton li portu ĝin senpage."

*Kurac:* Sed vi parolas pri la pago de metiistoj, kaj ni intencis nur la ambicion de kelkaj personoj krei metion el Esperanto mem—ekzemple, preni profiton el instruado, vendi propagandilojn, fari lekciojn por pago, fari akcikompaniojn por komercado je esperantaĵoj, kaj tiel plu.

*Komerc:* Sed ho, vi naivulo, vi rifuzas por la disvastigado de Esperanto la plej bonan rimedon. Antaŭe militismo kaj sklavismo regis la mondon. Nuntempe, komercismo kaj pagismo ĝin regas. Morgaŭ, homarismo kaj volonta servismo ĝin regos. Sed ankoraŭ estas hodiaŭ, kaj vi devas fari la hodiaŭan taskon laŭ hodiaŭa metodo. Esperantistoj ne devas forgesi tion, kaj laŭ mia opinio la plimulto el ili ne tion forgesas. Kion vi diras pri tio, Redaktisto? Vi mem propagandas Esperanto laŭ hodiaŭa metodo, kaj eble povas doni sciigon.

*Redakt:* Mi diras, ke en ĉiuj bonfaroj kaj malbonaj faroj estas miksaĵo de motivoj. Kaj ne ĉia pago estas mona pago. Neniu laboras por io senpage. Foje, la pago estas la laŭdo de homoj; foje, nur la plezuro pro bona ago; foje, la kredo, ke Dio vidos kaj aprobas; foje, ke la ĵurnaloj nin reklamos kaj tiel helpas nin en aliaj aferoj. Sed mia akcikompanio

estas simpla maŝino. Ĝi estas maŝino por la presigo kaj disdonado de ĵurnalo, propagandiloj, libroj, kaj tiel plu. Ĝi ne povas havi ĝojon pro laŭdoj, ĉar ĝi ne aŭdas ilin; nek pro kora konsento, ĉar ĝi ne havas koron; nek pro favoro de Dio, ĉar ĝi ne scias pri Dio. Ĝi estas maŝino, kaj ĝi manĝas monon same kiel vapormaŝino konsumas karbon. Se oni donas al ĝi sufiĉe, ĝi multon faras; se nesufiĉe, ĝi ne povas funkcii.

*Komerc:* Sed pardonu—ni ankoraŭ ne trafis ĝuste la celon. Antaŭ kelkaj monatoj (dum Januaro, 1910, se mi ne forgesas) vi publikigis en via ĵurnalo kvarpaĝan ruĝan folion, en kiu vi diris, ke sen tuja pligrandigo de intereso pri la laboroj de via maŝino, ĝi devus halti tute sian laboron. Nu, ni bone scias, ke centoj da Esperantistoj amas *Amerika Esperantisto*, kaj trege bedaŭrus ĝian morton. Sed mi volas ke vi diru, ĉu ĝi eliris el la embaraso per la helpo de tiuj, kiuj ne volas pensi pri mono kaj Esperanto en sama tago, aŭ per tiuj, kiuj pli bone komprenas ke komerca afero estas respektinda kaj necesa, eĉ ĉe Esperanto?

*Redakt:* Tio estas facile respondebla—nia ĵurnalo nun vivas kaj funkciadas per la faroj de kvar personoj, kaj el ili neniu, se mi dirus la nomojn, estus rekoncible kiel "eminenta Esperantisto." Sed ili faris la plej bonan laboron; ni dankas tiujn, kiuj faras paroladojn; ni dankas tiujn, kiuj varbas abonojn; kaj tiujn, kiuj sendas manuskriptojn; sed venis la tempo kiam sole mono, kaj iom multe da mono, povis daŭrigi nian laboron. Kaj tion alportis kvar nekonataj esperantistoj.

*Predik:* Sed via ĵurnalo ofte enuigas nin, ĝi tiom parolas pri mono pli ol pri la Fundamento.

*Redakt:* Kaj same viaj predikoj pli parolas pri mono, ol pri la morto de Jesuo, kaj same oni kritikis vin. Sed estas kiel diras la Komercisto, ĉio taŭga devas havi financon bazon.

# FOR BEGINNERS

## AJ, EJ, OJ, UJ

**T**HERE are many Americans to whom these innocent combinations of letters seem difficult, solely because they are unfamiliar in form. If the reader will follow carefully this analysis he need never after have the slightest trouble with his pronunciation of *aj, ej, oj, uj*. In the first place, let us, because this combination is more familiar to our ears and eyes, use the letter *y*, and place it *before* the vowel. Get your mouth shaped to pronounce *yet*, but hold it in shape for *y* and make a noise with your larynx. The sound you get is long *e*—*ee, ee, ee*.

Make this sound, following it with short *e*, and *a, o, u*: *ee-ah, ee-eh, ee-oh, ee-oo!*

Now shorten it a little, and you have: *i-ah, i-eh, i-oh, i-oo!*

Now shorten it still more and you get: *yah, yeh, yoh, yoo!*

Follow the same proceeding, but reverse the position of the troublesome half-vowel, half-consonant:

First you have: *ah-ee, eh-ee, oh-ee, oo-ee!*

Shorten it a little and they are: *ah-i, eh-i, oh-i, oo-i.*

Shorten them still more and blend together, and the sounds are *ahy, chy, ohy, ooy*, as in "why," "way," "toy," for the first three, but the last is not found in English. Yet it is formed exactly like the others and is just as simple, except that the initial letter is *u* instead of *a, e, or o*.

Now pronounce a list of words like these: *palaj, plcj, domoj, tuj*.

Say them twenty times or more, giving the *j* exactly the same sound after *u* as after the other vowels. Isn't it simple? And aren't you ashamed that you ever thought it difficult, and tried to say *too-yuh* or *tee-wee* instead of just *tooy?*

## WHAT ABOUT "ONIES"?

I wish to suggest the use of *onies* in cases of need, as it seems to me there is a really logical demand for such a word. Example: *Onies unua devo estas al la patrujo*. What do you think of such usage?—L. B.

